En Ago — venko nia!

POLA ESPERANTISTO

Monata Gazeto por propagando de Esperanto



ESPERANTYSTA POLSKI



Miesięcznik poświęcony sprawie Języka Międzynarodowego

Novembro 1911 | WARSZAWA—VARSOVIO. | Jaro IV (VI) — Nro 11 (56)

Szermierze pokoju.

Gorące życzenie powszechnego pokoju, wiara w lepszą, zbrataną ludzkość towarzyszyły narodzeniu się Esperanta. Bezwątpienia i dzisiaj nawet wszyscy jego zwolennicy i krzewiciele są rzecznikami pokoju i braterstwa ludów.

Jednakże pojęcie humanitaryzmu z jednej strony a idea językowa z drugiej, były wiele razy o tyle zbliżane i mieszane z sobą, że dla wielu ruch esperancki wydaje się jakąś sektą quasi-religijną, dążącą do zdobycia pokoju przez język neutralny, gdy inni dążą do tego samego celu przez rozbrojenia, akcję parlamentarną lub nawet przez rewolucję.

Wiadomem jest, że język nasz jako neutralny — jest narzędziem łatwo nadającem się do rozmaitych celów, zależnie do czego zostanie użytym. Pewnem atoli jest to, że ci, którzy się posługują Esperantem, są to ludzie dążący do pokoju wszechludzkiego.

I to jest naturalne.

Chcę tu zaznaczyć, że wielu z pomiędzy nas nie posiada zdolności walczenia. Umysł ich poddaje się wszystkiemu co jest wzniosłem i pięknem, zdolni są do poświęceń i entuzjazmu, ale dzięki swemu pokojowemu uposobieniu, nie mają energji czynu, pozostają biernymi optymistami. Są to marzyciele, którzy cieszą się zapowiedzią przyszłych zwycięstw; pełni są wiary, że szczęście ludzkości jest bliskiem, że narody porozumieją się i zbratają się. Powtarzają to ciągle ze spokojem i siłą się na wymowę; wierzą w spełnienie tego proroctwa lub konstatują fakty, ale stan rzeczy jest jednakowy i nic się nie zmienia.

Inni widzą w nas naiwnych zwolenników ruchu zbliżonego do spirytyzmu, antyalkoholizmu i teozofji, lub też garstkę natchnionych, którzy wierzą, iż „to, co się stać miało — stało się“ i głoszą braterstwo, humanitaryzm i t. d. Nie lubię tego esperantyzmu, który się bawi w iluzje i staje się śmiesznym dla drugich.

W pracy nad piękną naszą sprawą nie doszliśmy jeszcze do chwili ciszy i spokoju, jaki następuje po zwycięstwie, — nie jesteśmy jeszcze pracownikami, którzy strudzeni, wieczorem odpoczywają i podziwiają dzieło dnia całego. Pozostaje jeszcze dużo do zrobienia. Jesteśmy pracownikami przedświtu, którzy rozpoczynają pracę, śpiewając chłodnym rankiem, jesteśmy w przededniu wielkiego święta rodzinnego. My pierwsi witamy wschodzące słońce, które oświeci i ogrzeje pokolenia, jakie przyjdą po nas. Nasze dzieci zazdrościć nam będą, że walczyliśmy obok Mistrza żyjącego.

Roboty mamy dużo, ale jej ogrom nas nie przestraszy. Nie jesteśmy z tych, którzy ciągną korzyści z pracy swoich poprzedników, jesteśmy sami początko-

wymi szermierzami. Co znaczy 20 lat pracy dla takiego dzieła jak nasze, które wieki będą podziwiać!

Trzeba, abyśmy mieli taką odwagę, żeby inni widząc nasze wysiłki, nie spoglądali na nas z uśmiechem, ale przeciwnie, aby nas podziwiali, — musimy mieć zapał spokojny i nieugięty tych bohaterów, których nic nie wstrzyma.

Zbudźcie się marzyciele i poeci! Nie usypiajcie serc naszych próżną frazeologją, ale walczcie z nami, krzepcie nasze siły, mówcie nam o zwycięstwie i sławie. Morze jest mniej wspaniałem, gdy drzemie w promieniach słońca, — imponuje wówczas, gdy burza podnosi fale i wściekle miota je na brzegi lądu i skały żłobi.

Niech więc huragan zapału wionie na nas! Walczmy! Walczmy głosem i piórem, walczmy naszym rozumem i sercem, walczmy — gdyż walka jest przedziwnie piękną, bo walka — to życie.

(Z pisma „La Movado".)

Opinje wybitnych francuzów o Esperancie.

P. Michelin, znany przemysłowiec:

„Cenię Esperanto szczególniej z punktu komercyjnego i uważam, że każdy dom handlowy powinien mieć w liczbie swoich pracowników dwie osoby mówiące po esperancku. Niejedna firma handlowa musi rozsyłać cyrkularze w 8 językach; co za oszczędność czasu i kosztów, gdyby się to dało zrobić w jednym języku! Ażeby dojść do takich rezultatów, trzeba, by Esperanto był bardzo rozpowszechnionym, a handel i przemysł powinny się starać o to, gdyż dla nich jest on bez zaprzeczenia niezmiernie użytecznym.

Jerzy Maurevert. Wprowadzenie Esperanta do programów wszystkich szkół jest kwestją miesięcy zaledwie. Doprawdy, pozwólmy wyśmiewać się ludziom małej wiary... Ich synowie lub siostrzeńcy będą im jutro tłómaczami.

Pani **Séverine** („Prawa człowieka". Sobota, 13 maja). Ku przyszłości. Wczoraj wieczorem w hotelu Moderne było skromne zebranie uczonych, pisarzy, którzy wiedzą dobrze, że we Francji śmieszność nie zabija, jeżeli z nią walczy silna wiara we wzniosły ideał. Przykład idzie z góry: ze szczytu Golgoty, gdzie naigrawano się z Chrystusa przed ukrzyżowaniem Go. A jednak jego nauka zwyciężyła świat.

Do zwycięztwa również dążą ci ludzie, patrzący przejmującym wzrokiem z poza szkieł okularów, owe kobiety z twarzą inteligientną, ci cudzoziemcy o wzięciu się Francuzów, ci profesorowie żądni rozszerzyć mury szkolne, powiększyć laboratorja, uczynić głos swój donioślejszym, spotęgować rozmiar tablicy, gdzie kreślą niezłomne prawidła cyfr.

To nie są haluncynacje; ich marzenie opiera się na głębokich podstawach. Powoli, cierpliwie, bez wybuchów szalonych i cofań raptownych kroczą oni swoją drogą, jak wół roboczy orze pole, znacząc je głębokiemi bruzdy. I codziennie biorą górę nad obojętnością, zmniejszają zastępy wrogów, użyzniają nieurodzajne pola, gdzie rosną chwasty i osty, o których wyplenienie stara się wytrwały oracz.

To jest bankiet Esperanta! Narzecze powszechne! Uzupełnienie idei pokoju! Ogniwo łańcucha, które nie depcząc tradycji, kultury i uznając piękność każdego języka, połączy dzień wczorajszy z dzisiejszym, jak przezorna Marta biblijna przygotuje ucztę, do której zasiądą wszystkie Marje nawrócone.

A ja odtąd wytrwale pomagać mu będę w przygotowaniu tej uczty."

Tłom. H. Koch.

Kursy Esperanta dla początkujących!

Warszawskie Tow. Esperantystów urządza kurs dla początkujących; lekcje odbywać się będą dwa razy w tygodniu — we wtorki i piątki od 7—8 wiecz.; słuchacze płacą po 2 rb. za 10 lekcji; zapisy przyjmuje Redakcja „Esperantysty Polskiego" (Włodzimierska 8 — tel. 204—60) codziennie od godziny 8 wiecz

La fabelo pri kritikistoj.

Laŭ Jerome, K. Jerome.

Ian nokton mi sonĝis, ke tute neatendite mi troviĝas en ia ĉarma kaj fabela lando, kies loĝantoj havis tre altan kaj estimplenan opinion pri prudento de siaj kritikistoj. Evidente, ke la kritikistoj ankaŭ same kunopiniis.

Komence en la fabela lando ekzistis aŭtoroj verkantaj librojn. Sed, ho ve, la verkoj neniam trovis aprobon de la kritikistoj. Ili pruvis al aŭtoroj, ke en iliaj verkoj ekzistas nenio originala, kaj ke estus preferinde, se anstataŭ pasigadi la tempon tiel malutile — ili elfosadu terpomojn.

La aŭtoroj sub influo de tiaspecaj konsiloj kun kordoloro forlasisis sian profesion kaj efektive ili okupis sin je elfosado de terpomoj.

Tamen sur ĉi-tiu kampo ili ne trovis aprobon de la vasta publiko. Nealkutimiĝintaj al la nova speco de la laboro, ili plenumadis sian taskon malbone kaj maldiligente, kaŭzante al siaj labordonantoj grandajn malprofitojn.

Verdire, amindaj aŭtoroj — opiniis la terkulturistoj — vi preferinde revenu al via profesio — verkado; eĉ blinda povas juĝi, ke vi pli eble verkas librojn ol elfosas terpomojn.

En la mirinda lando, kiun vidis miaj okuloj en la sonĝa revo, komence ekzistis art-pentristoj. Iliaj verkoj ankaŭ estis opiniataj de la kritik-juĝistoj.

— Ho ve — ĝemis la kritikistoj — la pentraĵoj de niaj artistoj esprimas nenion originalan. La artistoj uzas ĉiam la samajn teknikajn rimedoj kaj kreas laŭ la sama metodo. La sama kiel ĉiam perspektivo, monotona kolormaniero, la sama sun-subiĝo, la sama ĉielo kaj homaj vizaĝoj. Ho, kial ili, malfeliĉuloj, ne okupos sin je pentrado de domoj aŭ purigado de botoj... Envere, ke ĉitiuj homoj senprudente perdas sian tempon por senvalora krea amuzo.

Enfine senvolontigitaj art-pentristoj prenis aŭ ŝtuparetojn aŭ skatolojn kun ciro kaj komencis la novan okupon.

Pli aŭ malpli simila sorto trafis skulptistojn, muzikistojn kaj poetojn.

Estis decidite, ke, verdire, la artistoj estas nur plagiatoroj, ripetantaj la samajn motivojn — nur en plej diversaj kombinoj.

— Ni bedaŭras vian tempon — diris la kritikistoj. — Vi preferinde balaŭu stratojn, lavu fenestrojn, disrompadu ŝtonojn sur ŝoseo.

Kaj jen en la tuta fabela lando mankis literaturistoj, muzikistoj, artistoj. La kritikistoj ne havis jam plu laboron kaj vivis en plena respekto de la loĝantaro.

La adoro por ili estis tiel komuna, ke ian tagon dum ia popola kunveno unu el parolantoj diris:

— Dank' al niaj kritikistoj, artistoj en la tuta lando ne pasigas tempon senutile. Sed ĉiu homo eraras. Ni ankaŭ en la ĉiutaga vivo sendube faras erarojn. Sole niaj kritikistoj estas sen riproĉo en ĉitiu rilato. Mi proponas, ke ni de nun subiĝu senescepte al kritiko de niaj kritikistoj. Ili juĝu niajn agojn, ili instruu nin vivi kaj ni entute adaptos iliajn konsilojn kaj indikojn.

La propono estis tutvoĉe aprobita kaj estis decidite konfidi al la kritikistoj direktadon de regado. La ĝojigitaj kritikistoj tuj alpaŝis al la laboro.

Do, kiam iu el la loĝantoj volis aĉeti domon aŭ se ies kokino demetadis ovojn — oni demandis la kritikistojn, kion ili pensas pri ĉi-tiu afero. La kritikistoj ĉiam mallaŭdis domojn, pruvante, ke la tuta lando posedas nek unu originalan konstruaĵon. Ĉiuj domoj estas similaj inter si. Ĉiu el ili estas konstruita laŭ unu maniero. Ili komenciĝis de fundamentoj, de keloj, poste sekvas ter-etaĵoj plue — leviĝas supren la etaĵoj ĝis la tegmento.

La samon oni opiniis pri la ovoj, en kiuj oni vidis nenion originalan; unu estis simila al dua — kiel dunaskitoj.

Interalie — ĉe la kritikistoj serĉis konsilon junaj enamiĝintaj paroj.

— Kara sinjorino — plej ofte re-

spondis la kritikistoj — post la atenta ekzameno ni povas nenion bonan diri pri via fianĉo. Ĉi-homo tute ne posedas signojn de originaleco.

Al junuloj ili plej ofte diradis:

— Grandaj dioj! En ĉi-knabino ekzistas nenio alloga. Ne grave, ke ŝi havas ĉarman vizaĝon, belforman figuron, anĝelan karakteron kaj ke en ŝi pulsas amo. En ĉio-ĉi estas nenio originala. De komenco de la mondo estis multe da tiaj knabinoj.

Nature, ke plejparte la geedziĝoj ne efektiviĝadis.

Dume la kritikistoj ne perdis la tempon vane.

Do ili mallaŭdis ĉiujn birdojn, ke ili kantas banale; ili plendis, ke floroj havas nek originalajn kolorojn, nek aromojn. Unuvorte ili kritikis ĉion, eĉ la sunon!

— De pratempo ĝi brilas — ili diris — kaj ĉiam la same ĝis enuigo banale.

Multfoje okazis, ke ia patrino, ravita de sia vere bela infano, kun fiero montris ĝin al la kritikistoj — la senindulgaj juĝistoj respondadis:

— Kion vi diras! Ja ĉi-infano havas nek unu atomon de originaleco. Ĝi rememorigas aliajn infanojn — do ĝi esas plagiato. Vere, ke oni devas bedaŭri tempon por kreadi tiajn aĵojn. Se vi ne povas produkti ion originalan, ni konsilas — anstataŭ naski infanojn, serĉu alian laboron.

Sed enfine venis kritika momento por la kritikistoj. Tio-ĉi okazis en la tago, kiam ĉi-tiuj severaj homoj eldiris tre mallaŭdan opinion pri la printempo, tiel simila al la aliaj — do tial ne originala.

Kaj jen, la sama parolanto, kiu iam invokis la popolamason al obeemo al la kritikistoj — flamigis la popolon per nova propono.

— Vere — li diris — sinjoroj kritikistoj! Sufiĉe jam da viaj juĝoj! Viaj kritikoj estas banalaj kaj vi mem havas nenion originalan. Vi ripetas tion, kio jam en antaŭhistoriaj jaroj estis banalaĵo. Mi proponas, ke ni dronigu la kritikistojn kaj tiamaniere por ĉiam liberiĝu de iliaj zorgoj!.. Enfine ni libere respiros.

Sed tio estas senekzempla barbareco! — responde ekkriis voĉoj de la kritikistoj.

— Senekzempla! — kriis la popolamaso. — Ho, enfine ni entreprenis ion senekzemplan, originalan kaj nun ni certe plaĉas al vi!

Tiel okazis. Oni dronigis ĉiujn kritikistojn kaj estis eldonita severa leĝo, kvalifikanta kritikon kiel severe puninda ago.

De tia tempo la vivo en la lando fariĝis multe pli bona. Kio okazis poste, mi ne povas diri, ĉar mi vekiĝis.

Trad. M. Czerwiński.

Kun Vi...

Kun vi mi kune, ho trezor',
Tra voj' arbara iras...
Por vi nur batas mia kor'
Per ardo brusto spiras.

Jen pro feliĉo ploras mi,
Juneca flamas sento,
Do vi, ho mia sun' radi',
Vekiĝu el silento!

Sur via brusto trovu mi
Trankvilon, senmemoron;
Do, ĉar animon prenis vi,
Al mi vi donu koron!

(El *Kabe.*) Trad. **M. Cz.**

LEOPOLD STAFF.

Forĝisto.

Tutan senforman mason de l' anim' profunda,
Juvelojn, kiuj bruston plenigis misteran,
Simile al vulkano el abism' senfunda
Mi elĵetas potence sur amboson feran!

Forte mi ĝin bategas per tondra martelo
En konfido gajeca, ĉar urĝas laboro,
Ĉar koron por mi forĝi mi devas — jen celo,
Fiera devas esti, granda, forta koro.

Sed se vi humiliĝos, koro, sub metalo,
Kaj rompiĝos sub feraj bategoj pasiaj:
En polvon vin frakasos monstraj pugnoj miaj!

Ĉar pereu, prefere, ol krevu sub ŝtalo,
Vivante malbenita en malfort' sur tero,
Difektita per fendo de sufer', mizero...

Kun permeso de l' aŭtoro tradukis **Juljan Tuwim.**

Enigmo de feliĉo.

(El pola ĵurnalo „Nova Reforma".)

La potenco de sugestio estas konata kaj aprobita en la mondo scienca. En vivo ĉiutaga nekalkuleblaj ekzemploj konfirmas reagon de unuj mensoj sur aliajn. Ĉiuj niaj pensoj, vortoj kaj agoj elfluas konscie aŭ senscie el ideoj de homoj, kun kiuj ni interparolas, disputas aŭ konsentas.

Estas homoj, kiuj influas bonfare je nia karaktero, agordiĝo kaj eĉ intelekteco; aliaj kontraŭe kaŭzas malbonan humoron, inciton kaj agordas al malhelaj pensoj. Unuvorte unuj portas kun si atmosferon serenan, aliaj — la nuban. Vivo havas siajn dornojn kaj pikilojn — ĝi estas vero, sed en ĝi malpliiĝus multaj malfeliĉoj kaj afliktoj, se ni pli multe da sereneco kaj suno en ĝin enlasus

Ne atentante kaj ne regante nin sufiĉe, ni alprenas fatalan kutimon grumbli kaj koleri dum iu ajn okazo, ĉe malgranda malagrableco. La edzo enfalas en malbonan humoron, ĉar la gazet-portisto tro malfrue alportis la gazetojn; la matena kafo estis tro malvarma aŭ ke la servistino malrapidas kun ordigo. La edzino plej malgravan vivan kontraŭecon plialtigas al potenco de vera malfeliĉo, ĉagrenas pro ĝi grave kaj kreas en la hejmo atmosferon pezan kaj premantan. Helaj, serenaj animoj estas ĉiam saniganta fonto por sia plej proksima ĉirkaŭo, ili estas varmaj, sunaj radioj post frosta vintro. Sole ilia ĉeesto inklinigas al gajeco, ridetoj kaj stimulas al bonaj faroj.

Eniru en la hejmon, kie vivas tia estaĵo, kaj vi eksentos tuj tiun-ĉi beatan atmosferon, precipe, se tiu-ĉi radio suna en familio estas patrino. Tuta ĉarmo kaj varmeco de doma fajrujo dependas de virino, kiu en ĝi regas. Estas virinoj, kiuj kie ajn ĉeestas, enportas kun si beatan helecon kaj serenecon. Feliĉa estas tiu, kiu tian elektos kiel akompanantinon de la vivo. Al ŝi ĉio iras bonege: kaj la

ordo en la mastrumado kaj la servistaro honesta kaj laborema, kaj gasto aminde vidita, kaj precipe ŝi facile kaj lerte direktas la edukadon de la infanoj.

Serena, gaja vizaĝo, indulga rideto kaj kora kareso de patrino — pli bone influas je harmonio de feliĉo familia, ol ĉiuj ŝiaj sekaj virtoj kaj ellaboritaj ordonoj pedagogiaj.

La formado kaj ellaborado de bona humoro plialtigas valoron de vivo. Japanoj tion-ĉi bone scias: gajeco estas ĉe ili ordono religia. Patrino-japanino de plej junaj jaroj instruas sian infanon renkontadi kun rideto sur la buŝo ĉion, kion povas alporti kun si la vivo. Kvankam al vi estus plej peze sur la koro, penadu esti gaja. Per ĉiuj fortoj de volo oni devas forpeli malbonajn kaj malagrablajn pensojn.

Malboneco, deprimiteco kaj teruro estas opiniataj kiel pekoj ĉefaj. Prezentado de sia ĉagreno malbone influas sur aliajn kaj ni ne havas rajton doni eĉ unu momenton de malgajeco al nia proksimulo.

Ĝi estas „credo", grandege altruista kaj ellaboranta bravecon de animo. Infanoj estas edukataj en ĝi de fruaĝo; do en Japanujo gajeco estas ĝenerala kaj malgaja mieno estas malofta escepto.

Multaj el vi, legantoj, pensos mallaŭte aŭ diros laŭte: „Oni ne povas esti ridetanta, se oni havas en animo gravan doloron kaj veran ĉagrenon".

Malvero! Ĉio estas ebla. Oni devas nur en si perfektigi la volon, ekzerci sin al memregado. Ni ne povas eviti malfeliĉon, sed ni povas renkonti ĝin tiel aŭ alie.

Unika vojo al feliĉo estas ma tutanima dezirego kaj peno akiri ĝin per propra penado kaj laboro. Ĝojo estas suno de l' vivo. Ĉiutage ĝi frapas al la pordo de nia domo, sed ni tiel estas absorbitaj, ke ni ne aŭdas la frapadon.

Kaj ĉu vi pensas, ke pli facile al ĝi eniri en domon de riĉuloj, ol de malriĉulo? Tute ne. Ĝi povas lokiĝi en mizera ĉambreto, havanta nudajn blankajn murojn, lignajn tablojn kaj seĝojn, sed tute ĝi mankas en bela domo, kie ĉiu ĉambro ravas okulon de artisto de kie per mono oni forigis brutalajn detalojn de vivo, povantaj ofendi sentojn. Ĉar ĝia fonto loĝas en la animo de loĝantoj, en kortuŝa sento edzina al edzo, la patrina al infanoj kaj de infanoj inter si. Ĉiu sekve domo, riĉa aŭ malriĉa, povas ĝin posedi. Patrino nur enportu tiun-ĉi sunon kaj resto da membroj de familio obeos al influo kaj senscie iros laŭ ŝia postsigno. — Plej grandvalora kaj plej feliĉiga el donacoj, kiajn patrino povas doni al siaj infanoj, estas kutimigo al serenaj, gajaj pensoj kaj vortoj.

Plej bona mastrino imitinde subtenanta la mastrumadon, distingiĝanta per pacienco kaj laboremo, ne faros domon sian ĉarma kaj varma, se ŝi ne posedas en si serenan karakteron kaj donon de gajeco. Agrable estas vidi pure frotitajn pargetojn, brilantajn lustrojn kaj manĝilaron, sed pli agrabla estas tiuĉi spirita atmosfero de domo, en kiu sana rido de infano ne estas bruo, kie grizaj horoj ne estas enuo kaj vivaj paroladoj — malpaco aŭ grumblo.

Kredu al mi, ke vivo ne estus tiel malfacila kaj peza, se homoj pli facile ridus. Sincera rido ankaŭ laŭ fiziologia vidpunkto estas tre dezirinda: ĝi ekscitas agadon de koro kaj cirkuladon de sango, bonfare influas je proceso de digesto, profilaktas diversajn malsanojn de hepato. Ĝi dispelas malutilajn por sano emociojn kaj agas je nervoj kiel trankviliganta narkotaĵo. Alkonduku la koleritan homon al rido, certe li estos tiam senarmigita.

„Mi volus esti gaja, sed la naturo faris min pli ĝuste mordema kaj kvankam kun tio-ĉi estas al mi malbone, mi ne havas je tio konsilon" — diros iu.

Malvero! Estas konsilo: oni devas hardi karakteron, rompi ĝin kaj fleksi kaj insiste kun persisto rapidi al la celo.

„Semu penson — kolektu vorton; semu vorton — kolektu agon; semu agon — kolektu kutimon; semu kutimon — kolektu karakteron; semu karakteron — kolektu sorton" — parolas angla proverbo.

Per ofta ripetado niaj agoj fariĝas maŝinaj, same ankaŭ animon kaj volon oni povas ekzerci por forpeli senkonscie preskaŭ sentojn deprimantajn, kiuj deprenas kuraĝon al laboro kaj vivo, kontraŭe por konservi tiajn, el kiuj povas naskiĝi agoj utilaj por bono de individuoj kaj por feliĉo de l' tuta homaro.

K. M. R. *Esperantigis AEL.*

Parlamento de la esperantistaro.

(La reprezentantaro.)

Niaj legantoj konas jam „Aldonon al la Kongresa Regularo“ de d-ro L. L. Zamenhof, en kiu nia Majstro proponis, ke ĉiu esperanta grupo, konsistanta almenaŭ el 25 membroj, elektu unu delegiton kaj tiamaniere estu reprezentata dum ĉiu Internacia Esperanta Kongreso. Do, laŭ tia sistemo la tuta esperantistaro havus siajn reprezentantojn, kiuj povus decidi ĉiujn proponojn, projektojn, deklarojn faratajn dum la Kongreso. Tiam la kongresajn laborojn kaj decidojn regus volo de la tuta esperantistaro.

La projekton de d-ro Zamenhof renkontis plena aprobo de la esperantistaro, ĉar dum la VII-a Kongreso funkciis la Rajtigita Delegitaro. Dum la unua kunsido de „Delegitaro“ — naskiĝis demando pri principo, *ĉu estonte la decidoj de la Kongresoj estos voĉdonitaj de rajtigitaj delegitoj de la propagandaj societoj — aŭ ne?*

Se tiu principo estos akceptita, — iam estos fondita vera internacia Parlamento de Delegitoj, kunsidantaj ĉiujare dum la universalaj Kongresoj; tiam ankaŭ estos starigita ĉionsuperanta leĝdonanta korpuso, elektita de la popolo esperantista kaj kapabla esprimi, ĝiajn dezirojn, ĝian volon.

La diskuto ne estis longedaŭra, ĉar la projekto de la *Parlamento* estis akceptita de 1000 voĉoj kontraŭ 19 (neaj). En la regularo por la delegitoj estis enkondukitaj du ŝanĝoj — nome:

1) Ne plu estos necese kolekti subskribojn: prezidanto de ĉiu societo deklaros la nombron de ĝiaj membroj, kaj estos po unu delegito por 25 membroj.
2) Estos konsiderataj kiel membroj de societoj tiuj membroj, kiuj pagos jaran kotizaĵon al la kaso de l' Centra Oficejo.

Cetere niaj legantoj trovos la plenan kaj definitivan tekston en la „Oficiala Gazeto“.

Do la *Parlamento* estas fondita.

Opozicion faris nur U. E. A., konsiderante la projekton kiel danĝera konkurenco por U. E. A. La direktantoj de U. E. A. esprimis timon, ke apud-ekzisto de du grandaj organizaĵoj estos ne bona, kaj ke unu malhelpos la agadon de la dua. „La Revuo“ per jenaj vortoj trankviligas (ĉu trankviligis?) U. E. A.: „Neniu povas nei la servojn, faritajn de U. E. A. al Esperanto; ne povas ekzisti Esperanitsto, kiu ne rekonas la praktikan utilecon de tiu vasta Asocio; sed tamen oni ne povas forgesi la rolon kaj laboron de la propagandaj societoj. *Ili semas, kaj U. E. A. rikoltas.*“

Tutan ideon de la Parlamento kaj U. E. A. enfermis d-ro Kandt en du teoremoj:

1-a Premiso: estas du kampoj.

Konkludo: ĉiu kampo devas havi sian propran organizon. Sekve, ĉar jam ekzistas U. E. A. sur la **per-esperanta** kampo, — la propagandaj societoj kaj la oficialaj institucioj devas kunfandiĝi sur la **por-esperanta** kampo.

2-a Premiso: inter la du kampoj estas multaj kontaktoj, kaj ne estas difinebla limo.

Konkludo: kiam sur ĉiu kampo ekzistos ĝenerala organizaĵo klare kaj bone difinita, tiam oni devos starigi pontojn, ligilojn, reciprokajn helpojn — eĉ, se necese, komunajn servojn (kiel ekzemple komuna jarlibro, komuna *oficiala organo* k. c.) inter ambaŭ kampoj.

(Laŭ „La Revuo“.)

Por koncizigi debatojn kaj diskutojn estis akceptita jena rezolucio:

La rajtigitaj delegitoj de la esperantistaj propagandaj societoj, konvinkitaj, ke estas dezirindaj:

1) Ĝenerala organizaĵo por doni firman bazon al la oficialaj jam ekzistantaj institucioj, nome: la Konstanta Komitato de la Kongresoj, la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio, la Administra Komitato, la Centra Oficejo kaj ĝiaj servoj, ilin subteni kaj interligi;

2) Unuiĝo de la naciaj esperantistaj propagandaj societoj;
3) Amikaj kaj efikaj interrilatoj inter la propagandaj kaj la specialaj aŭ fakaj societoj, kiel ekzemple U. E. A.

La komisiono estas elektita kaj ĝi tuj komencis labori. Ni kredas, ke dum la VIII-a Kongreso en Krakovo — ĉio estos difinitive finita. Niaj fortoj estos kunligitaj. *M. Cz.*

Paroladoj pri Kalifornio.

S-o D. E. Parrish, oficiala reprezentanto de la Komerca Ĉambro de Los Angelos, Kalifornio, Usono — alveturis Eŭropon por fari propagandon de la mirinda lando de Ameriko — Kalifornio, kaj samtempe, prelegante en Esperanto — li propagandas nian lingvon. S-o P. legis jam pri Kalifornio en 24 urboj de Eŭropo kaj ĉie li trovas bonan akcepton. Ĉar vere indas sukceson lia tre interesa prelego, ilustrata per 200 eksterordinare belaj lumbildoj, kiujn jetas sur ekranon perfekta elektra aparato.

Antaŭ okuloj de rigardanto aperas kiel en kalejdoskopo ĉarmaj vidaĵoj: mirformaj rokoj, brilantaj per ĉiuj koloroj de ĉielarko, montoj ĝisĉielaj, kovritaj per eterna neĝo, baskoj de oranĝaj kaj citronaj arboj, fleksiĝantaj de pezaj fruktoj, eukaliptaj arbaroj, palmoj, kaktoj, gazonoj de diverskoloraj floroj, herbejoj, plenaj de or-flavaj floroj, vilaoj, preĝejoj ĉirkaŭitaj per maro da floroj kaj apude de tio domoj deksesetaĝaj, bazaroj je speco de 16 hektaroj, elektraj tramoj, ligantaj vilaĝojn kaj urbojn je distanco de 1700 kilometroj.

La lando antaŭ ne multaj dekoj da jaroj estis dezerta, senhoma, en kies sino sin kaŝas neelĉerpeblaj riĉaĵoj, en tiel mallonga tempo ŝanĝiĝis en la paradizan ĝardenon.

Kalifornio havas 3 milionojn da loĝantoj, sed ĝia spaco — 410,000 □ kilom. — povas nutri 40 milionojn da homoj. La loĝantaro kreskas rapidege: antaŭ 10 jaroj la urbo Los Angelos havis 102 milojn de loĝantoj — hodiaŭ ĝi kalkulas 320 milojn — sur spaco de 240 □ kilometroj.

Ĉarmaj estas grandiozaj lum-vidaĵoj de la valo Colorado kun la ŝtoniĝintaj arbaroj kaj grandegaj arboj; tre interesa estas industrio frukta, kiu provizas per fruktoj Eŭropon; mirinda estas drenad-sistemo de dezertoj kun reto da kanaloj kaj estas vere interesaj aliaj kultur-aranĝoj.

Estus tre dezirinde, se Varsovia Societo Esp. invitus s-on Parrish Varsovion, des pli, ke la mon-kondiĉoj ne estas tro grandaj: por la parolado oni devas pagi al s-o P. nur 25 ₰.

Ankaŭ ni rekomendas la paroladon al aliaj societoj, kiuj povas ricevi detalojn, skribante al s-o P. laŭ adreso: „U. E. A. — Genevo — rue de la Bourse № 10“.

S-o P. havis lastatempe tre sukcesplenan paroladon en Lwów kaj en Kraków, kie lian paroladon tradukis polen s-o J. Mędrkiewicz.

M. Cz.

Scienco kaj vivo.

Fianĉino kaj ekzameno je kuir-arto.

Norvega parlamento — la plej progresema rilate al virinaj aferoj — jam ne unufoje debatis pri antaŭigaj kondiĉoj, de kiuj estus dependata geedziĝo. Nune la parlamento pridiskutadis projekton de la antaŭ-edziniĝa ekzameno. Ĉiu fianĉino antaŭ la edziniĝo devas pruvi antaŭ la regno, ke ŝi scias kuiri kaj — la plej grava — kuiri memstare. Tia ekzameno estos deviga por ĉiuj kandidatinoj al edziniĝo senescepte. Antaŭ ĉio substrekas la signifon de kuirscio la parlamentaj riprezentantoj de la popolo, argumentante, ke sen bona nutraĵo ne ebla estas bona harmonio en geedzeco.

Estus interese scii, kiom da kandi-

datinoj al edziniĝo ĉe ni — „falus“ dum tiu ekzameno. Estas tute eble, ke norvegaj virinoj en estonteco submetos al parlamento tian projekton: ĉiuj kandidatoj al edziĝo estu severe ekzamenataj. Bona kandidato devas respondi al jenaj kondiĉoj: li devas pruvi sian laborkapablon, havi konformajn viv-rimedojn, pruvi fidelecon, ekzaktecon, toleremon, bonecon, juri ke li ne drinkos, ne fumos, ne kart-ludos, juri blindan obeemon ktp. ktp. Kaj kio okazos, se la kompatema por virinoj norvega parlamento aprobos tiun projekton... Mi tiam kondolencos vin, ho kompatindaj viroj! Tioĉi ankaŭ povas kaŭzi, ke ĉiuj viroj en Norvegujo aŭ restos en fraŭla stato aŭ are elmigros kaj iros al landoj malpli kompataj por virinoj.

Loĝantaro de Japanujo.

Laŭ oficiala statistiko en 1-a de Januaro de k. j. nombro de la loĝantoj en Japanujo egalis 49,587,283 homojn: 25,048,399 viroj kaj 24,541,884 virinoj. Se al tio aldoni la loĝantaron de japana deveno en Koreo kaj Formozo, egalanta ĉirkaŭ 12 milionojn — rezultos, ke nombro de japanoj atingas 65 milionojn.

Nutreco de lakto.

Longa vico da esplor-pruvoj, faritaj kun diversaj nutrigaj artikoloj, enhavantaj en si amelon, grason kaj albumenon, donis sekvantajn rezultatojn: freŝa ĉasaĵo je prezo 50 kop. enhavas 425 nutrigajn unuojn; samkosta kvanto da bova viando enhavas 740 unuojn, grasa ŝafaĵo — 1023, fromaĝo — 2039, freŝa lakto — 2056 kaj enfine kremo preskaŭ trifoje da tiom. Tio konkludigas nin, ke la plej malmultekosta kaj la plej nutriga nutraĵo estas lakto. *M. Cz.*

Konsideru!

Sentencoj kaj afirismoj de Fr. Nietzsche *(el la verko: „Tiele diriris Zaratustra“).*

Iom da frenezo ĉiam estas en amo, sed eĉ en frenezo ĉiam estas iom da prudento.

Per tondroj kaj per fajro ĉiela oni devas alparoli al dormantaj kaj al dormemaj sentoj.

Jen mi mortas kaj malaperas, — unu momento kaj mi fariĝos nenieco. Animoj estas egale mortemaj kiel korpoj.

Vivo sen plezuro estas senvalora; batalo por plezuro estas batalo por vivo.

Iaj edzoj veis, ĉar oni delogis iliajn edzinojn, sed pli multaj veis pro tio, ke neniu volis delogi iliajn edzinojn.

Se geedzoj ne loĝus kune — bonaj geedzecoj estus pli oftaj.

(Trad. K. Wasilewski.)

Kelkaj paradoksoj de Oskar Wilde.

Vulgareco — estas konduto de homoj aliaj.

* * *

Mensogo — estas vero de homoj aliaj.

* * *

Unu tolerebla societo estas societo de mi mem.

* * *

Ĉiu krimo estas vulgaraĵo — sed ankaŭ vulgareco estas krimo.

* * *

Nur simpluloj konas sin mem.

* * *

Nia estinteco — ni mem.

* * *

Esti antaŭtempe matura signifas — esti perfekta.

* * *

Amo devas pardoni ĉian vivon, krom vivon sen amo.

* * *

Amo devas pardoni ĉiajn kulpojn, krom kulpojn kontraŭ ĝi mem.

* * *

El ĉiuj amoj plej longedaŭra estas memamo, ĉar ĝi daŭras ĝis morto.

* * *

Vivo de viro estas pli valora ol vivo de virino — ĝi kaŭzas pli gravajn konsekvencojn, ĝi havas pli larĝajn celojn kaj pli altajn aspirojn.

Vivo de virino turniĝas en rondo de sentoj.

Virino, kiu scias konservi amon de viro kaj mem amas lin — faris ĉion, kion postulas, aŭ povas postuli de ŝi la mondo,

Forto de virino troviĝas en tio, ke nenia psikologio povas ŝin komprenigi. *M. Cz.*

Kroniko.

Anglja.

Londyn. Lord-Major Londynu Sir Vezey Strong został honorowym członkiem U. E. A., co ma wielkie propagacyjne znaczenie.

— „British-Esperanta Asocio“ posiada 136 filji we wszystkich miastach Anglji i kolonji angielskich (według spisu w ostatnim n-rze „British Esp.“.

Hollandja.

Rotterdam. Utworzono Holenderski związek kolejarzy i tramwajarzy esperantystów „Rotterdam“.

Węgry.

— Dr. Al. Giesswein, członek parlamentu, wniósł do parlamentu dezyderat wykładu Esperanta we wszystkich szkołach węgierskich.

Niemcy.

Drezno. Przedkongresowe dni od 16 do 18 sierpnia zgromadziły 500 esperantystów różnych narodowości.

— Dziesięciu urzędników miejskich tramwajów elektrycznych w obecności dyrektora tramwajów p. Nier'a, wyższego inspektora p. Böhmig'a i inż. p. Mertens'a zdawało egzamin z znajomości języka Esperanto.

Braunschweig. Na kursy jęz. Esperanto uczęszcza między innymi 20 inżynierów i urzędników firmy Amne, Giesecke & Konegen.

Poznań. Powstała grupa esperancka „Verda Stelo“ (Wilhelmstr. 32).

Hiszpanja.

Madryt. W oficjalnej gazecie madryckiej dn. 15 lipca rb. ogłoszono królewski rozkaz do ministra publicznego nauczania, zezwalający na wykłady Esperanta we wszystkich szkołach państwowych Hiszpanji. Profesorów Esperanta mianują towarzystwa esperanckie

Jest to bezwątpienia wielki krok naprzód.

Samos.

— Wskutek wezwania księcia Samosu do uczęszczania na kursy Esperanta, zorganizowane specjalnie dla nauczycieli — większość nauczycieli wyspy przechodzi kurs tego języka. Ostatnio wydano dyplomy 29-ciu nauczycielom.

Pola Kroniko.

Ĉar lastatempe ni ne ricevis komunikojn el la provinco — ni insiste petas niajn korespondantojn alsendi al ni mallongajn raportojn pri la provinca movado.

Varŝovio.

La 5-an de Oktobro okazis en „Uranja“ monata postlibertempa kunveno de varsoviaj samideanoj.

S-o Leo Belmont, vera majstro de elokventeco, petata de s-o Grabowski, la prezidanto, kaj aliaj admirantoj de liaj prelegoj, diris improvizan — sed kiel belan! — paroladon pri „Malfacileco de kreado de artefaritaj lingvoj“. Li kun mirinda kono de la temo skizis la historion de ideografio, pazigrafio, priskribis la principojn de Volapük, faris paralelojn inter diversaj sistemoj de lingvoj, konigis al la aŭskultantoj principojn de la lingvo ĥina k. al. — Ni aŭskultis nian respektindan parolanton kaj havis impreson, ke ni legas belan, sciencan, tamen popularan libron.

La publiko dankis s-on L. Belmont per longaj aplaŭdoj.

S-o Antoni Grabowski detale raportis pri la Antverpena Kongreso, montris interesajn fotografaĵojn de kongresaj grupoj kaj vere transportis ĉiujn en Antverpenon — kie kun la aŭskultantoj li refoje travivadis la neforgeseblajn impresojn...

Dankesprimaj aplaŭdoj revenigis la „ekskursantojn“ en Varsovion, kiam s-ro G. finis la rakontadon pri la VII-a Kongreso.

S-o M. Czerwiński deklamis kelkajn poeziojn kaj inter aliaj — la belan versaĵon de L. Belmont „Se havus mi forton kaj spiron de l' vento“ — en esperanta traduko de A. Grabowski.

La multpersonan kunvenon finigis la diskusio pri la VIII-a Kongreso en Krakovo, dum kiu ree parolis s-o Belmont, ravigante la aŭskultantojn per sia inspirplena parolo kaj per tralego de tuje tradukita „Saluto al Antverpena Kongreso“ de s-o Grabowski.

Hej — towarzysze!
Z Warszawy bram
Serdeczny pokłon
Przynosim wam;
Niechaj go każdy
Przyjmie jak brat
I niech go niesie
Przez cały świat!
Luba Antwerpjo,
Przyjm pokłon; wierz,
Że polskie serce
Uderza też;
Że gdzieś nad Wisłą,
Jako wśród was,
Dźwięk Esperanta
Raduje nas;
Że się wyciąga
Przyjazna dłoń,
Gdy mknie *saluto*
Przez polską błoń!
Chociaż otacza
Zewsząd nas noc,
Wierzymy: Przyjdzie
Słoneczna moc!
I Esperanta
Błyśnie nam dzień,
Tam, gdzie dziś gwia-
Ozłaca cień; [zda
Szerzyć się będzie
Serdeczna cieśń,
Zabrzmi Nadziei
Zwycięska pieśń;
Więc ślę modlitwę
D nieba bram —
By Bóg pozwolił
Słyszeć ją nam!

— La Komitato de Pola Esp. Societo aranĝas 9-an de Novembro je la 8-a horo vespere en „Uranja“ (Bracka 18) monatan kunvenon de la membroj kaj gastoj kun la sekvanta programo:

1. Unu horo pri Esperanto, dialogo pro kaj kontraŭ Esperanto (s-oj B. Jabłkowski kaj M. Czerwinski;
2. Pri traduko de polaj ĉefverkoj — esperanten — s-o Antoni Grabowski;
3. Kompletigo de la Societa Komitato;
4. VIII-a Kongreso en Krakovo;
5. Enskriboj por kursoj de Esperanto;
6. Pri aranĝo de la prelego la de s-o Parrish pri Kalifornio.

La membroj estas petataj enkonduki gastojn.

Superaj kursoj de Esperanto.

Varsovia Esperanta Societo por doni al staj membroj eblon perfektiĝi en uzado de Esperanto kaj tiamaniere pretigi ilin al Krakova Kongreso, kie ni poloj devas ne nur balbuti esperante, sed *flue, modele kaj imitinde* paroli, aranĝas superan kurson de Esperanto.

La kurson gvidos prezidanto de la Societo, s-o *Antoni Grabowski,* kies lingvan sperton kaj perfektecon ni ne bezonas laŭdi. La lecionoj konsistos el konversacio, diskutoj, klariga legado, esperanta literaturo poezio k. ct.

La kurso komenciĝos meze de Novembro kaj okazos ĉiuvendrede de la 7 ĝis 8 vespere. 5 lecionoj kostos 1 rb. Enskribiĝoj akceptas s-o Grabowski (Hoża 42 — tel. 55—44.

Parolado de s-o Rosenstock.

Ni sukcesis trovi en „The British Esperantist“ paroladon de s-o Rosenstock dum ferma kunsido de VII-a Kongreso.

La suprenomita gazeto skribas:

...Nun venas la demando pri la sidejo de la Oka Kongreso. S-o Mudie anoncas, ke la loko akceptita de la K. K. K. estas Krakovo en Galicio, Aŭstria Polujo. Tiun akcepton la Kongreso unuanime konfirmas.

Tiam venas al la tribuno por paroli en la nomo de siaj samlandanoj, d-ro Leono Rosenstock el Krakovo, kies bele sonatan voĉon kaj klaran parolmanieron oni ofte aŭdis kun plezuro dum la kongresaj diskutoj. Li dankas por la honoro, kiun faris al krakovaj samideanoj la ĵusa akcepto.

„Nun Esperanto — li diris — kiu eliris el sia patrolando malforta infano, revenos maturiĝinta kaj forta. Sur pola tero ni festos do la 25-jaran jubileon de nia lingvo. Krakovo, plej pura tipo de pola urbo, krom historiaj monumentoj, unu belan trajton heredis de siaj prapatroj, nome — la antikve konatan polan gastamon. Ne nur amason da vidindaĵoj posedas la urbo, sed en la ĉirkaŭaĵo troviĝas io unika en la mondo — la famekonataj sal-minejoj. Ne mankas ankaŭ majestaj montoj. Venu kaj admiru! Ni streĉos ĉiujn niajn fortojn, por ke estu solena manifestacio, sed la stampon de soleneco povas doni nur la esperantistoj. Ni pretigos, ili efektivigos. Kaj rimarku, Krakovo okupas preskaŭ centran situacion en Eŭropo. De Krakovo al Dresdeno, Barcelono kaj Antverpeno estas eĉ ne unu milimetron pli proksime, ol de Dresdeno, Barcelono kaj Antverpeno. Ĝis la revido en Krakovo!“

Lian elokventan paroladon, facile aŭdeblan en ĉiu parto de l' granda halo,

salutis viva aplaŭdo. Efektive, la poloj scias paroli Esperanton!

La edziĝo de la esperantisto.

La 14-an de Oktobro, en la Evangelika preĝejo okazis geedziĝa ceremonio de nia konata varsovia samideano s-o *Jerzy Loth* kun f-ino *Wanda Gessner*. Esperante presitaj invitkartoj venigis en la preĝejon la samideanojn, kiuj pere de nia gazeto esprimas al la juna paro la plej korajn bondezirojn.

Niaflanke ni esprimas al la gesinjoroj Loth nian samideanan saluton kaj bondezirojn. *La Redakcio de „P. E.“.*

Krakovo.

La societa vivo ĉe ni jam komenciĝis: nune funkcias du komencaj kursoj, entute partoprenas ĉirkaŭ 25 lernantoj; marde okazas ĝeneralaj kunvenoj kun literatura karaktero, dum kiuj estas legataj novaj tradukoj de niaj membroj kaj ankaŭ originalaj laboroj. Inter ili ni aŭdis kelkajn ĉapitrojn el „Quo vadis?“ en traduko de f-ino Zofja Kronenberg, priskribon de Varsovio laŭ personaj impresoj de inĝeniero Krobicki kaj la poeziaĵojn de s-o J. Kriss. Ankaŭ dum mardaj kunvenoj priparolataj estas aktualaj aferoj el esperantista mondo. Lastfoje ni aŭdis bonegan prelegon de s-o B. Kuhl pri „Internacia organizaĵo de esperantistoj“. *J. Mędrkiewicz, sekretario.*

Galicia gazetaro pri Esperanto.

La Antverpena Kongreso, preparaj laboroj al la Krakova Kongreso, la Esperanta Ekspozicio en Lwów, kie ankaŭ okazos kongreseto de Galiciaj esperantistoj kaj la lasta prelego de s-o Parrish pri Kalifornio — donis al la gazetoj abundan materialon ĉu por notoj, ĉu por pli longaj artikoloj pri nia afero.

Kaj nome:

Filatelista (n-ro 6—7) enhavas bonegan propagandan artikolon de s-o Jeni.

Lvovaj gazetoj:

Kurjer Lwowski — en kelkaj numeroj skribis pri la okazinta Kongreso, pri la propaganda prelego de s-o Wł. Giercuszkiewicz en Bochnia, enpresis la invokon por la VIII-a Kongreso en Krakovo kaj fine raportis pri la prelego de s-o Parrish.

Gazeta Wieczorna, *Wiek nowy*, *Przegląd Poniedziałkowy*, *Słowo Polskie* — enhavas artikolojn pri la prelego de s-o Parrish, pri la okazonta Kongreso en Krakovo k. c.

Krakovaj gazetoj:

Simpatiajn artikolojn pri suprecititaj temoj skribis jenaj gazetoj: *Głos Narodu, Czas, Nowa Reforma.— Nowości Ilustrowane* donis artikolon pri VII-a Kongreso kun fotografaĵoj (grupoj).

La simpatiaj vizitoj.

— En nia redakcio ni plezure akceptis manĝurian samideanon — s-on *Vonaho*, pacjuĝiston el Manĝurio. S-o Vonaho, malgraŭ fremde sonanta familia nomo, estas polo, de infaneco vivanta en malproksima Siberio.

Pole kaj esperante li rakontis al ni impresojn el la VII-a Kongreso kaj priskribis al ni vivmorojn de manĝurianoj kaj frostigis nin, rakontante pri teruraj ekzekucioj de kaptitaj manĝuroj-rabistoj, kiuj estas punataj per senkapigo are po 30—40 homoj.

— Ankaŭ vizitis nin tre simpatia malnova samideano s-o *Leon Trojanowski*, arbara kaj drenteknika inĝeniero el Chinocza (Wołyńska gub.). De s-o T., kiu fervore propagandas nian lingvon inter siaj konatoj, ni eksciis pri kelkaj samideanoj-poloj, kiuj, vivante malproksime de esperantaj centroj — estas tute izolaj esperantistoj — ekz. s-o Niepokojczycki en Worobin (Woł. gub.).

— Veturante VII-an Kongreson, vizitis nin vere fervorega samideano, s-o *Bronisław Radzimiński*, direktoro de Aŭditorio en Zaporojje Kamienskoje (Jekaterinoslavska gub.) kaj prezidanto de tiea Esp. Societo.

S-o R. en alsendita al ni letero esprimas „neesprimeblan raviĝon“ pro la okazinta VII-a Kongreso; ravite li priskribas „neforgeseblajn tagojn“ en Dresden dum la Antaŭkongreso kaj fine — tute prave — fieriĝas pro la „Diplomo de kapableco“, kiun li ricevis post ekzameno en Internacia Esperanta Instituto.

Ho, daŭru kaj disvastiĝu vera flamanta entuziasmo por nia kara afero!

Nia Literatura Jarlibro.

Ni rememorigas al niaj legantoj, ke nia **Literatura Jarlibro** aperos en la Decembro de k. j.; ĝi estas mendebla ĉe nia administracio (Hoża 20) je prezo 0,50 por abonantoj kaj 1,00 por ne-abonantoj.

La enhavo de la Jarlibro:

Historiozofio de lingvo internacia de *St. A. Dobrzański.*

Mia poŝhorloĝo, novelo de M. Konopnicka, trad. de *Kabe.*

Pax, novelo de Jerzy Żuławski, trad. de *Wł. Grabowski.*

Sommo-Sierra, la fragmento el „Uragano“ de Wł. Gąsiorowski, trad. de *D-ski.*

En krepusko, poezio de Leopold Staff, trad. de *Juljan Tuwim.*

La ĝemo de l' vivo, el „Pan Graba“ de Eliza Orzeszkowa, trad. de *M. Czerwiński.*

Libroj de Profetoj, filozofiaj poemoj de Antoni Lange, trad. de *A. Grabowski.*

Fabelo pri la homo feliĉa, novelo de Jerzy Żuławski, trad. de *M. Czerwiński.*

Nalo kaj Damayanti, el sanskrito trad. de *Antoni Lange.*

Al mokantoj, artikolo de *St. A. Dobrzański* kaj kelkaj aliaj.

Fakty.

Dostawa furażu i Esperanto.

P. Schmid, delegowany U. E. A. w Bernie, opowiada w czasopiśmie „Svisa Espero“ następujące zdarzenie: Pewien dostawca furażu, którego p. Schmid spotkał przypadkowo, skarżył się na brak siana w Szwajcarji — miał liczne zamówienia, a nie mógł im zadosyćuczynić.

— Wiem, że w południowej Francji są pomyślne zbiory w tym roku, ale nie znam francuskiego języka i nie mam tam znajomości.

— Może mógłbym panu pomódz, znając Esperanto — odpowiedział z uśmiechem p. Schmid.

— Esperanto? Co to jest? Pierwszy raz słyszę tę nazwę. Gdzie można tego dostać?

P. Schmid udzielił szczegółowych objaśnień i dostawca zgodził się, aby p. S. napisał w tej materji do esperantystów w połud. Francji.

W krótkim czasie nasz kupiec posiadał ogromny zapas siana, który mu pozwolił podołać wszystkim obstalunkom.

Esperanto i literatura.

Jeden z najpoczytniejszych autorów katalońskich, p. Ioaquim Ruyra, zainteresował się bardzo Esperantem. Wyraził też życzenie, aby ostatnie jego dzieło było wydane w esperanckiem tłomaczeniu. Będzie to niewątpliwie najlepszy sposób, aby p. Ruyra był czytany przez świat cały.

Zastosowanie Esperanta.

Coraz większe ma zastosowania w praktyce język pomocniczy.

Francuskie Tow. Balneologiczne (Paryż, ul. Marasine № 27), które ma na celu zwiększenie frekwencji kuracjuszów w miejscach kąpielowych, rozesłało cyrkularz ze wskazówkami, tyczącemi się różnych miejsc kuracyjnych — w językach: francuskim, niemieckim, włoskim, hiszpańskim i esperanckim.

Pierwszy numer dziennika stowarzyszenia techników przestrzeni wolnych i ogrodów publicznych — zawiera zawiadomienie po francusku i esperancku, w którym jeden z członków, p. Ziegler (Avenue de Suffren 34 — Paryż) oświadcza, że wszelkie informacje mogą być udzielane w języku esperanckim.

Wreszcie rocznik aeronautyki i awjatyki „Atmos“, który właśnie zaczął wychodzić pod redakcją p. Paul Manoury, znanego redaktora „Petit Journal'u“, jest wydawanym w sześciu językach, między którymi nie pominięto i Esperanta.

Powyższe fakty — a moglibyśmy wyliczyć i wiele innych — są jasnym dowodem użyteczności naszego języka.

Wkrótce nie będzie ani jednego handlowca, nie posiłkującego się Esperantem, gdyż ten, któryby go nie posiadał, nie mógłby współzawodniczyć ze swymi konkurentami.

El Esperanta Mondo.

Propaganda vojaĝo.

Famekonata esperanta oratoro-prelegisto s-o Edmond Privat, akompanata de sia edzino, intencas dum ĉi-tiu vintro vojaĝi tra Eŭropo por fari literaturajn prelegojn en Esperanto. S-o P. faros ankaŭ paroladojn en franca lingvo pro supozebla pli granda frekvento kaj profito. Kiu grupo volus inviti la prelegiston — skribu pri detaloj al s-o Privat, Ĝenevo, 19, Pont d'Arc.

U. E. A. kaj la Esperantistaj Kluboj.

Pro la malapero de la jarlibro de Hachette ne plu ekzistas organizita ĉiujara eldonaĵo, en kiu estos trovebla la nomaro de esperantistaj kluboj kaj societoj. Estus do tre utile, kaj eĉ tute neĉese, ke ĉiu esperantista societo konatigu sin al la mondo pere de la jarlibro de U. E. A., kiu aperas akurate ĉiujare kaj estas disdonata al ĉiuj esperantianoj en la tuta mondo. (La nombro de societanoj estas nuntempe ĉirkaŭ 8,000).

Por tion fari, sufiĉas, ke ĉiu societo aliĝu al la U. E. A. kiel esperantia entrepreno, pagante kotizajon po 2 ℳ jare. Tiu pago rajtigas la esp. societon presigi en la jarlibro anoncon 20-vortan. La klubo do povus doni la nomojn de siaj komitatanoj, la adreson de la sekretario kaj aliajn sciigojn, utiligeblajn de ĉiuj samideanoj. Jam la Londona Klubo kaj aliaj societoj de plej granda Londono aliĝis!

Por ke la nomoj aperu en la jarlibro por 1912 — estas necese, ke oni sendu la sciigojn

kun kotizaĵo antaŭ la komenco de Novembro al la oficejo de U. E. A., 10, rue de la Bourse, Geneva, Svisujo. („The Brit. Esp.")

Universala Esperanto-Asocio.

Unu el la ĉefaj rezultatoj de la dua Kongreso de U. E. A. estis la starigo de fakaj sekcioj. Tiuj fakaj sekcioj, kiuj povas havi apartan nomon, celas plifaciligi la rilatojn inter la personoj interesiĝantaj pri sama fako, studi la demandojn, kiuj koncernas la servaron de tiu fako, kaj propagandi U. E. A. kaj Esperanton ĉe siaj samfakanoj. La aligo al tiuj fakoj estas laŭvola. Ĉiu membro devos, kompreneble, esti samtempe esperantiano. Ĉiu fako eldonos specialan bultenon, kiu estos senpage sendata al ĉiuj ĝiaj membroj. La faka kotizaĵo estas 50 sd. jare, pagebla tuj de nun, ĉu senpere al la centra oficejo de U. E. A.

Por 1912 la Komitato decidis la kreadon de la jenaj fakoj, kies regularoj estis voĉdonitaj:

Interŝanĝa fako (aŭ Universala Interŝanĝa Asocio) — Fakestro: s-o M. Lévy.— Organo: Interŝanĝa Bulteno.

Laborista Fako (aŭ Universala Laborista Asocio) — Fakestro: s-o Ed. Parker. — Organo: Laborista Bulteno.

Virina Fako (aŭ Universala Virina Asocio)— Fakestrino: s-ino Legrelle. — Organo: Virina Bulteno.

Por helpi al la plibonigo de la financa situacio estis starigita nova kategorio de *subtenantaj membroj.* Tiuj membroj pagos kotizaĵon de 2 ₰ (entenantan la ordinaran membran kotizaĵon). Ili senpage ricevos ĉiujn aldonojn de la Jarlibro.

Ĉar la societa jaro de U. E. A. komenciĝas la unuan de Novembro, oni de nun repagu sian kotizaĵon por 1912. Kiel la lastan jaron, la kotizaĵo estas 50 sd. kaj rajtigas al senpaga ricevo de la Oficiala Jarlibro.

La Jarlibro de U. E. A. por 1912 aperos en Decembro. Oni do bonvolu sendi antaŭ la fino de Novembro, ĉiujn korektojn, adresŝanĝojn, aliĝojn aŭ re-aliĝojn de esperantiaj entreprenoj k. t. p. Ni speciale atentigas la esperantistajn societojn, ke aliĝante kiel esperantiaj entreprenoj (kotizaĵo 2 ₰), ili estos enregistrigataj en la jarlibro kun ĉiuj informoj pri sia estraro, adreso, kunvenejo k. t. p.

Dum 1911 la nombro de la esperantianoj atingis *7804.* En *113* regionoj estis pli ol 20 membroj. *(Oficiale komunikita.)*

Bibliografio.

Multaj esperantistoj scias, ke en Saratov ekzistas la plej vasta esperanta biblioteko de s-o Georg Davidov, kiu de 1888 ĝis 1911 zorge kolektis ĉion esperantan. La jus fondita „Germana Akademia Esperantista Ligo", decidinte eldoni sciencajn verkojn de ĝenerala intereso, opiniis, ke ne estas pli inda materialo por la unua volumo, ol la dua korektita kaj pliigita eldono de la katalogo de tiu biblioteko. Prezo: 1 ₰, ĉe Heckners Verlag, Wolfenbüttel (Germanujo).

Ni rekomendas al niaj samideanoj:

Skribi al la „Commercial Club", Takoma, Washington, U. S. A., kiu responde sendos sendube interesajn informojn pri la ŝtato Washington kaj pri la urbo Tacoma, kiu pro sia milda klimato, beleco kaj pureco iĝas ideala urbo por hejmserĉanto. Do, vi skribu!

Peti, ke oni sendu al vi „Luksan Gvidlibron en Esperanto de la Fervoja Kompanio de Orleans". Adreso: Bureau de Trafic-Voyageur-Publicité, 1, Place Valhubert, Paris.

Sendi ĉiajn ajn esperantaĵojn por Ekspozicio — al s-o Benedikto Herold, Lwów, str. A. Potockiego (Galicio-Aŭstrio), kun surskribo: por Ekspozicio.

Bibliografio.

Principes logiques de la formation des mots par *René de Saussure,* privat-docent à l' Université de Genève. Première Partie. Genéve, Librairie Kündig, 11 Corraterie 1911. Paĝ. 122.

Tiu-ĉi libro, kies unua parto estas eldonita, koncernas Esperanton nur flanke kiel unu el la vivantaj kaj nature disvolviĝantaj lingvoj, ĉar ne Esperanto, sed la aliaj lingvoj indoeŭropaj, speciale la lingvo franca, estas esploratai de l' aŭtoro en la „Logikaj principoj de vortfarado". Pri Esperanto s-o de Saussure eĉ tute ne parolas, uzante nur por siaj ĝeneraligoj kelkajn konstantajn simbolojn: o, a, e, i, kiujn li ĉerpas okaze el nia lingvo.

Des pli valoraj estas la konkludoj de la aŭtoro. Por la ne-esperantisto la libro estas tre interesa lingvoscienca prelego, klariganta al li el nova vidpunkto la konstruon de lia lingvo gepatra. Sed la esperantisto, kiu konas la eminentan esperantan verkon de prof. Saussure: „Logika bazo de vortfarado en Esperanto", trovas samtempe la plej bonan pruvon, ke la logika bazo de vortfarado en Esperanto estas la ĝenerala homa logiko, retrovata en aliaj lingvoj, kaj ne anstataŭebla per ia nove elpensita de s-o Coutuart aŭ iu alia.

Ni rekomendas varmege la verkon al niaj samlandanoj sciantaj la lingvon francan.

A. G.

La Reĝo de la Ora Rivero aŭ La Nigraj Fratoj de *John Ruskin*, trad. *Ivy Kellerman* (Esper. Bibl. Intern. № 18). Esperanto-Verlag, Möller & Borel, Berlin. Prezo ℳ 0,10; paĝ. 41.

Tre beleta, ĉarma fabelo de Ruskin, trovis bonan tradukinton en persono de prof. Ivy Kellerman kaj laŭdindan eldonejon — firmon Möller & Borel, kiu per ĉi-tiu leginda volumeto pliriĉigis rekomendindan kaj malmultekostan „Bibliotekon".

Kometo de Haleo; Krimo — du rakontoj de *T. Ŝĉavinski* (Esp. Universal-Biblioteko), Rigo. ℳ 0,10; paĝ. 15.

Du tute modestaj rakontetoj, skribitaj (eĉ verkitaj) en tute bona Esperanto.

Aliaj verkoj ricevitaj kaj priparolotaj:

Disrompu ni la intermurojn — Respondo de Teosofiano.

Signifo de akciaj societoj por la esperanta movado.

Oficiala Jarlibro de Bohema Unio Esperantista.

La malsanulo pro imago, komedio de Molière.

La turisto kun la verda stelo, monologoj.

Funebra parolado de Bossuet.

Ostlorn-vilaĝaj skizoj de S. Ulfers.

Bombasto Furioza, burleska, tragedia opereto de W. Barnes Rhodes.

Libro de Kantoj de Heinrich Heine.

Kelkaj vortoj pri Teosofio.

Hermeno kaj Dorotea de Goethe.

Revuo de la Gazetoj.

(2|X) **Kaŭkaza Esperantisto** (Aŭgusto).
(3|X) **Oficiala Gazeto Esperantista** (25 Oktobro).
(4|X) **Le Monde Espèrantiste** (Septembro). Kongresa numero.
(4|X) **Gazeto Hispana** (Septembro).
(5|X) **Libera Penso** (Aŭg.—Sept.).
(5|X) **Eĥo Esperantista** (Sept.).
(6|X) **Brazila Esperantisto** (Majo—Junio).
(6|X) **Mitteilungen** (Sept.—Okt.).
(6|X) **Kataluna Esperantisto** (Sept.).
(6|X) **Internacia Socia Revuo** (Okt.).
(6|X) **Welt-Post** (25 Sept.).
(6|X) **Rund um die Welt** (Okt.—Nov.).
(6|X) **Germana Esperantisto** (Oktobro).
(7|X) **German-Aŭstria Esperantisto** (Sept.).
(9|X) **The British Esperantist** (Okt.). Kongresa numero.
(10|X) **Esperanto** (Oktobro).
(15|X) **ĈasopisČeskych Esperantistŭ** (Aŭg.-Okt.)
(15|X) **La Revuo** (Oktobro).
(16|X) **Franca Esperantisto** (Okt.).
(16|X) **Japana Esperantisto** (Aŭg.)
(16|X) **Bulletin Officiel** (Okt.)
(17|X) **Tutmonda Espero** (Aŭg.—Sept.).
(18|X) **La Holanda Pioniro** (Okt.)
(18|X) **Le Corresp. International** (Aŭg.,Sept.,Okt.)

Enhavas esperantan bibliografion, verkitan de nia sperta samideano Sam. Meyer, kiu, laŭdante librojn skribitajn en pura, bonstila Esperanto — plendas (tre prave!), ke multaj gazetoj kaj broŝuroj estas skribitaj tute senstile, senzorge, erarplene. S-o Meyer skribas:

„En la lastaj jaroj la rapidega disvastiĝo de Esperanto naskis grandan nombron da verkistoj. Ĉu en la gazetoj, ĉu en la libroj aŭ broŝuroj ili liveras al ni literaturan aŭ sciencan legmaterialon, iafoje bone redaktitan, aliafoje ne tute korektan. Malĝuste estus plendi pro la multiĝo de la esperantaj verkistoj. Tamen nia devo estas atentigi ilin pri la neceseco bone kaj funde lerni la lingvon, antaŭ ol verki en ĝi, kaj zorge relegi siaj verkajojn antaŭ ol presigi ilin; eĉ legigi kaj korektigi ilin de kompetenta samideano.

Esperanto estas admirinda, riĉa lingvo. Ni zorge konservu ĝin pura kaj hela, eĉ en ĝia necesa evoluado."

Tre gravan rimarkon de s-o Meyer ni varme aprobas.

(18|X) **Kataluna Katoliko** (Aŭgusto kaj Sept.).

Kiel *pendant* al opinio de s-o Meyer — ni permesas al ni citi jenajn fragmentojn el la gazeto „Kataluna Katoliko"; ili estas veraj kuriozajoj (la skibmaniero kaj preseraroj — konservitaj):

„*Pli taŭgas lerteco ol forto.* Alfonso, reĝo de Aragon'o, la del juvelfaristo vizitadis laborejon kune kun siaj korteganoj. Apenaŭ el-

irinte kun ili, lin renkonten iris la juvelfaristo, plendante, ĉar al li multpreza diamanto rabita estis.

Por la redonon de la juvelo pli facile atingi sed de la kulpulo honto, orkruĉon el brano duonplenigi ordonis la reĝo, kaj ke tien la manon ĉiuj enmetus, li unue ekzemplon donante.

Tiel ili ĥin faris, kaj la diamanto, neniu sciante, kiu estis, reaperis.

„*Ĉe Razejo.* Oni razis la barbob al iu kliento, kaj tial ke li rimarkis, ke la haŭton ŝiris la razilo, ĉar ĝi estis akrajrompita, frapis la atenton de l'barbiro, kiu per instruitecafekto, tre ofte inter tiuj de sammetio, ekkriis: ĉu vi scias... kiel la razilo mineralo estas... kaj ke la haro, vegetalo...; kaj vi estas besto, rispondis la kliento."

Neniel oni povas toleri tian ignoradon de nia kara lingvo. Bedaŭrinda fakto!

(17|X) **Riga Stelo** (Marto—Aprilo).

(17|X) **Nova Sento** (Sept.—Okt.).

(18|X) **La Dek-Sepa** (Okt.)

(18|X) **La Ondo de Esperanto** (Sept.—Okt.). Enhavas la artikolon klarigantan la rilaton de s-o Postnikov al rus-esperanta movado.

(19|X) **Greklingva Esperantisto** (Aŭg.—Sept.).

(19|X) **Hungarlanda Informilo** (litografia revueto — Oktobro):

„Venteto de iu granda, komuna dezirego iras tra la mondo. Iri antaŭen, efektivigi la malnovajn revojn kaj ilin alvenigi al celo ne sur la ŝoseo de miliono da homoj, sed sur la flora vojeto, kie mi iradas plej antaŭe, kaj poste ĉi-tien, sur tiun vojeton voki kaj alporti tiujn, kiuj post mi volas veni."

(22|X) **Nederlanda Katoliko** (Sept.—Okt.).

(23|X) **Le Phare Sténographique** (Okt.).

(23|X) **Normanda Stelo** (Okt.).

(24|X) **Espero Katolika** (Oktobro).

HUMORAĴOJ.

Faliĉilo trafis ŝtonon.

Pasaĝero. Pelu vian ĉevalon pli rapide. Ni malfruiĝos al la vagonaro.

La fiakristo. Mi ne povas, sinjoro: mi estas membro de societo por favorado de bestoj.

Ĉe la stacidomo — la fiakristo. Donu, sinjoro, ankaŭ trinkmonon!

La pasaĝero. Mi ne povas: mi estas membro de kontraŭalkohola societo.

Anonco en estonteco.

Luebla estas loĝejo kun ĉiuj oportunajoj: lumigado — radiuma; hejtado — per subteraj tuboj el centro de la tero; hangaro por aeroplano; ĉambro kun kradoj por bopatrino; krematorio (por bruligado de kadavroj); senfadena telefono; telefongrafaj koncertoj.

Romano sen titolo.

Ŝi... li... kameno...
Ĉirkaŭpreno...
Ama propono...
La edzo... bastono...
„Pardonu sinjor, la eraro"...
Vojaĝo tra la ŝtuparo...
Kaj sur la strato!..
Adiaŭ, frato.

(La Ondo de Esperanto.)

Respondoj de la Redakcio.

Al s-o Fer Vora. La humoraĵo ne konvenas por ni.

Al s-o Feliks Wierzchowski en Łuków. Ni kore dankas pro via konsilo. La libron ni baldaŭ tralegos kaj ni taksos ĝian tradukindecon.

Al s-o Julius Glück. Ni dankas.

Al s-o Salviro en Łódź. Ni kore dankas.

Al s-o Giercuszkiewicz en Lwów. Ni kore dankas vin pro alsenditaj gazetoj.

Al s-o K. von Frenckell, prezidanto de Societo Esperanta, Dresden. Ni tutkore dankas vin pro via honoriga kaj afabla propono. Ni volonte ĝin akceptus, sed nia revuo ne estas kaj ne povas esti oficiala organo de la Oka pro malproksima alilokeco. Cetere Krakovo havas propran organon „Esp. Informilo". Vian leteron ni sendis al s-o R-ck en Krakovo.

Al kelkaj. La adresojn de polaj esperantistoj ni kolektas nur por nia redakcia, neeldonota adresaro, tamen ni volonte akceptas alsendatajn al ni adresojn de samideanoj.

Redaktor-Wydawca Eldonanto-Direktoro **Jan Günther.** Tel. 204-60. Sekretarz Sekretario **M. Czerwiński**

Presejo: L. Bogusławski, Varsovio. Ś-to Krzyska 11, tel. 195-52.